

ISSN : 0827-3154

2007/2

*Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No 40046355 for Lumo*

*Posté conformément à la convention de vente no 40046355 pour Lumo du service Poste-publications de Postes Canada*

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

aŭtuno / vintro 2007

Lumo



Montrealo 2008

[www.esperanto.ca/kea/](http://www.esperanto.ca/kea/)

*Lumon* eldonas dufoje en jaro. KEA, 6358, rue de Bordeaux, Montréal (QC) Kanado H2G 2R8

*Lumo* ("Light") is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association

*Lumo* («Lumière») est la revue trimestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

## ENHAVO DE LA NUMERO

Vortoj de la prezidanto de KEA (N. Fleury) .....	3
La estraranoj sin prezentas .....	4
Post 50 jaroj (K. Price).....	7
Libroservo de KEA .....	7
Esperantigado de amerikaĵoj.....	8
Kiel funkcias la plej multnombra grupo en Kanado? .....	8
Okazis en Kanado (N. Fleury) .....	9
Dankeme pri la ricevitaj donacoj .....	9
ARE 2007 - raportas komencanto.....	10
Avo Frosto respondis .....	11
Esperanto-diplomo .....	11
Nove kaj interese el la reto.....	12
Gazetaraj komunikoj de UEA.....	13
Kalendaro de kanadaj Esperanto-eventoj.....	14

Eldonkvanto de ĉi tiu numero : 175

Redaktis: Normando Fleury (kun helpantoj)

Provlegis: Francisko Lorrain kaj Ken Price

Presis kaj distribuis: Normando Fleury (kun helpantoj)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri la aŭtoro, respondecas la redakcio. La artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi kontribuaĵojn al la redaktoro.

PAUL HOPKINS

#55 – 9520 Bonaventure Drive SE

Calgary, AB, T2J OE5

*hoppaul@gmail.com*

**SE VI ANKORAŬ NE REALIĜIS AL KEA POR 2008,**

**BONVOLU SENDI VIAN PAGON AL LA KASISTO :**

KEA-kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, ON, K1H 8J4

*Sinceran dankon !*

## Vortoj de la prezidanto

Estas por mi plezuro saluti vin komence de mia deĵorado kiel nova prezidanto de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA). Mi aktivas en la movado jam de multaj jaroj, ĉefe ĉe provinca nivelo, sed tamen partoprenis kongresojn en Eŭropo kaj ankaŭ aliloke en la mondo.

Mi konscias, ke, en la movado, same kiel en la mondo, kunlaboro estas la bazo por sukceso. Nova prezidanto kutime alportas novajn ideojn. Mi ja intencas proponi ŝanĝojn en la movado kun helpo de la estraro. Mi konscias, ke prezidanto ne povas ĉion fari sole kaj ke nia estraro ne povos multon atingi sen via subteno — t. e. sen la subteno de vi, la membroj de KEA.

Nu, kiuj estas la defioj por la movado? Mi ne reinventos la radon, sed ja informado estas la bazo. Mi ĉiam miras renkonti homojn (junajn kaj malpli junajn), kiuj neniam aŭdis pri Esperanto. Necesas informi kaj informi pri la ekzisto de Esperanto — sed ankaŭ pri la avantaĝoj, utilo kaj atingoj de la lingvo kaj ĝia movado. Kiam sufiĉe da homoj estos bone informitaj, tiam multaj (ne ĉiuj, tamen, bedaŭrinde) pretos lerni la lingvon. Ni havas nuntempe grandegan helpilon, la reton. Rete eblas informiĝi, lerni, babili, aŭdi, vidi, paroli... fakte movadumi en sia hejmo. Ĉu bona afero, jen temo por alia artikolo...

Post lernado, la sekva paŝo estas aktivado en la movado, aŭ almenaŭ aliĝo al ĝi, kaj vi atingis tiun nivelon. Gratulon! Ankaŭ tion ne ĉiuj faras. Ni almenaŭ esperu, ke ĉiam estos homoj, kiuj dediĉos sin al la progreso kaj pluvivo de la movado.

Jen, mi alvenas al peto. Eĉ se al vi ne eblas multe aktivi, ĉu vi povus almenaŭ skribi al ni, kion vi opinias pri la kanada Esperanto-movado? Mi do invitas vin plenigi la enketilon, kiu troviĝas ene de Lumo. Vi povas plenigi kaj resendi ĝin kune kun via aliĝo al KEA por 2008.

Kaj ni invitas vin samtempe — kial ne? — aliĝi al la 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE-7), kiu okazos dum julio 2008 en Montrealo. TAKE-7 estos certe la plej granda Esperanto-evento de la jardeko en Kanado. La kongresa komitato multe aktivas por pretigi kiel eble plej bonan kongreson. TAKE-7 estos por vi ebleco partopreni en internacia kongreso kun ĉeesto de latinamerikanoj kaj eŭropanoj. Bonvenon en amerika Esperantujo!

Mi nun lasu vin. Vi ja havas pliajn paĝojn por legi. Ĝuu la revuon kaj estos interese aŭdi vian opinion pri KEA!

Normando Fleury  
*prezidanto*

## Sinprezento de la estraranoj de KEA por 2008/2009.

**Yves Bellefeuille** : Mi estas 45-jara kaj, kvankam mi venas el Ontario, mia denaska lingvo estas la franca. Mi ĉefe aktivis en Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kiam mi ankoraŭ estis junulo (dum la antaŭa jarmilo), kie mi estis estrarano pri kongresoj, vicprezidanto, kaj ĉefe ĝenerala sekretario. Mi ankaŭ estis sekretario de la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Montrealo, en 1992.

En mia flanko vivo, mi estas advokato kaj laboras en Otavo kiel kontrolanto de la oficialaj tradukoj de la Federacia Kortumo kaj de la Imposta Kortumo. Kvankam mi kutime estas sekretario en Esperantaj kaj ne-Esperantaj asocioj, mi kandidatis por esti kasisto de KEA. Mia sola celo estas, ke la mono de KEA estu bone prizorgita kaj ke aperu klaraj financaj raportoj.

Yves Bellefeuille

**Normand Fleury** : Mi volas prezenti min al vi, sed ne tro scias kion skribi, ĉar mia Esperantista vivo jam longas. Nu mi komencu de la komenco. Mi eklernis la lingvon en 1979, sed vere aktivis nur post la IJK en Rauma, Finnlando, en 1980. Mi tiam vivis en Eŭropo kaj ĝue partoprenis plurajn renkontiĝojn tra la tuta Eŭropo. Por mi, tuj dekomence, Esperanto estis utila por vojaĝi kaj malkovri vivantan komunumon kaj kulturon.

Mi konatiĝis kun kroata virino (Zdravka Metz) pere de la lingvo kaj edziĝis al ŝi en Zagrebo en 1981. En 1982 ni decidis veni vivi en Kanado. Wally du Temple rapide aŭdis pri ni kaj transdonis al ni la respondecon de la landa oficejo de KEA kaj de la informa fako franclingva. Ni verkis La Lumo kaj Alumeto dum iom da tempo, transprenis la libroservon en 1984, kaj ĝi estas en nia domo de tiam. Ni havas du denaskulojn, Damir kaj Mira, kiuj flue kvarlingvas, nun plenkreskis kaj studas ĉe universitato.

Mi fariĝis prezidanto de la Esperanto-Societo Kebekia kaj kun aktiva estraro, dum pli ol 25 jaroj, organizis dekojn kaj dekojn da renkontiĝoj provincaj, interprovincaj kaj ankaŭ kelkajn landajn kongresojn, kaj la *Internacian Junularan Kongreson* de TEJO en 1992. Nuntempe mi daŭre kunorganizas la *Mez-Kanadan Renkontiĝon* (MEKARO) kaj *Aŭtunan Renkontiĝon de Esperanto* (ARE). Mi ne listigos ĉion, kion mi faris por la movado dum la pasinta kvaronjarcento, ĉar tio estus tro longa... Mi nur aldonu, ke dum la venontaj monatoj, mi dediĉos mian energion al la *7<sup>a</sup> Tut-Amerika Kongreso de Esperanto* (TAKE-7), kiu okazos en Montrealo dum julio 2008.

Longan vivon al la E-movado !

**Geoffrey Greatrex** estas membro de KEA ekde 1995 kaj lernis Esperanton en Britio en 1985. Li rapide entuziasmiĝis pri la lingvo kaj aktivis en JEB (Junularo Esperantista Brita), kiun li prezidis de 1988 al 1990, kaj en EAB (Esperanto-Asocio de Britio), kiun li prezidis inter 1991 kaj 1993 kaj 1997 kaj 1998.

Reveninte al Kanado, kie li naskiĝis en Otavo en 1968, li transprenis la redaktadon de la revuo Lumo inter

2000 kaj 2004. Inter 2005 kaj 2006 li prezidis KEA-n. Krom sia agado en Esperantujo, li instruas romian, helenan kaj bizancan historion je la Universitato de Otavo.

Bondezirojn!

**Benjamin Irwin** : Karaj geamikoj, mi estas treege dankema pro via ĝisnuna subtenado de ĉiuj miaj streboj atingi nivelon de ioma kompetenteco en tiu ĉi lingvo.

Unue eksciinte pri Esperanto en julio 2006, mi tuj sentis akordon interne kun la virtoj enradikiĝintaj en la movado mem, nome idealista espero eĉ dum oni frontas timigajn defiojn, strebo al egaleco inter ĉiuj popoloj, kaj la rajto je egaleca komunikado. Krom mia modesta agadeto en la kanada movado, mi ankaŭ poeziumas (almenaŭ laŭ mia limigita kapablo), kaj estas aktiva membro de la kluboj pri dramo kaj debatado enlerneje.

Mi ankaŭ firme kredas ke oni dece traktu sian korpon, do mi kuras sepkilometran distancon ĉiutage (iom malsaĝa decido miaflanke pro mia astmo, tamen per la ĝustaj medikamentoj tio kutime ne estas problemo). Mi ankaŭ lastatempe fariĝis vegetarano danke al stimula debato pri la moraleco de viandmanĝado kun mia instruisto pri filozofio; miajn gepatrojn mi milfoje dankas pro tio ke ili toleris mian preskaŭ senavertan dietŝanĝon. Mi promesas al ĉiuj ke mi dediĉos mian tutan strebpovon por certigi ke la kanada movado neniam trivialiĝu, perdu sian konstantan kreskadon aŭ prosperon, kaj mi vere antaŭĝojas la estontan kunlaboron kun la cetero de la estraro kaj kompreneble ĉiuj aktivaj Esperantistoj. Dankon pro tiu ĉi mirinda oportuno!

**Boris-Antoine Legault** : Saluton ! Mi estas esperantisto el Montrealo, aktiva ĉe Esperanto-Societo Kebe-  
kia (prezidanto) kaj Amerika Komisiono de UEA. Ekde januaro 2008, mi ankaŭ estas estrarano de Kanada Esperanto-Asocio.

Kiel estrarano de KEA, mi intencas en la venontaj du jaroj labori kun aliaj estraranoj kaj membroj de nia organizo por plifortigi la promesplenan kanadan Esperantan movadon. Interalie, mi esperas kontribui al pli efika komunikado inter KEA kaj ĝiaj membroj, plia videbligo de Esperanto en la ne-Esperantista mondo (amaskomunikiloj, internaciaj organizoj, k.a.), kaj (2008-e) sukcesigo de la sepa Tut-Amerika Kongreso de Esperanto.

Laboriste, mi instruas biologion ĉe kolegio kaj cetere ankaŭ foje agadas por ekologiaj kaj pordemokratiaj organizoj.

**Ken Price** : Mi naskiĝis en 1936, en Anglujo, lernis Esperanton kiam mi estis ankoraŭ lerneĵano en 1954, kaj venis al Kanado per ŝipo en 1957. Mi unue paŝis sur kanada grundo en Kebekurbo, kie mi pasigis agrablajn vesperojn antaŭ ol la ŝipo daŭrigis la vojaĝon al Montrealo, la dua kanada urbo kiun mi vizitis. Post vizito al parencoj de mia avo, kiuj migris al Toronto antaŭ la unua mondmilito, mi ekloĝis en Toronto, trovis postenon en kemia laboratorio, kaj restis.

Eĉ antaŭ ol mi trovis laboron, mi kontaktis la delegiton de UEA, s-ron Smilga, kaj renkontis ankaŭ Dez Hackett. Estis interesa tempo, ĉar la Esperanto-movado komencis progresi en Kanado ĝuste tiam. KEA refondiĝis en 1958, kaj la unua nacia kongreso de KEA okazis en Montrealo en julio 1959. Nacia? Jes, ĉar venis Esperantistoj ne nur el Kebekio, kaj Ontario, sed eĉ unu el Saskaĉevano.

En postaj jaroj, mi ĉeestis multajn kongresojn de KEA, kelkajn de ELNA (nun E-USA), kaj kelkajn Universalajn Kongresojn. Sed tio estas nur ĝuado pere de Esperanto. Kion pri kontribuo al la movado?

Dum kelkaj el la fruaj jaroj de KEA mi servis en la estraro, foje kiel sekretario aŭ kasisto, kaj en la fruaj 60-aj jaroj mi transprenis la libroservon de eldonisto/presisto Rudiger Eichholz, kaj dum kelkaj jaroj prizorgis ĝin por KEA. Dum la pasintaj kvar jaroj, mi denove servis kiel sekretario de KEA.

Dum proksimume 15 jaroj mi korektas ekzercojn por studentoj de la senpaga dek-leciona retroŝta Esperanto-kurso.

Alia biografieto estas en unu el miaj retpaĝoj ĉe [www3.sympatico.ca/kenprice13/](http://www3.sympatico.ca/kenprice13/)

**Allan Simon** : Mi loĝas en Calgary, enmigrinte 18-jaraĝa el Aŭstrio en 1963. Tie mia familio havas profundajn radikojn en la Esperanto-movado: mia avo Otto Simon esperantistiĝis en 1902. Li partoprenis la unuan UK-on en Bulonjo kie li fariĝis membro de la Lingva Komitato. Mia patro Josef ankaŭ flue parolis, sed mi eklernis la lingvon nur en 1975 kiam mi loĝis en Shawanigan (en Kebekio).

Depost mia translokiĝo al Calgary mi aktivas en la loka klubo kaj partoprenis ses UK-ojn. Mi deĵoris kiel kasisto de KEA kaj kiel sekretario de la Eduka Fondaĵo Carson. Mi antaŭĝuas miajn devojn kiel vicprezidanto de KEA.

Profesie mi laboris kiel sistemanalizisto ĝis mia emeritiĝo antaŭ du jaroj. Mia edzino Meredith estas Esperantistino, sed niaj du gefiloj kaj du nepinoj ne (ankoraŭ) eklernis Esperanton.

**Bob Williamson** eklernis Esperanton dum la fruaj okdekaj jaroj post kiam li aŭdis anonceton en radio pri senkosta perpoŝta kurso. Antaŭ ol li finis ĝin, sub la gvidado de Kim Keeble, Bob jam fariĝis grupano de la halifaksa diskut-rondeto. Tamen, krom sia servado en la estraro de KEA, li redaktis la ĉiumonatan gazeteton de la halifaksa rondo *Inter Ni* (fondita en 1985) dum la plejparto de ĝia ekzisto, kaj daŭre redaktas ĝin.

## KEA fondita antaŭ 100-jaroj, refondita antaŭ 50 Jaroj



La unua Kanada Esperanto-Asocio, laŭ la jarlibro de UEA 1912, estis fondita la 1an de novembro 1907, antaŭ 100 jaroj. Ĝi ĉesis funkcii en 1941 pro la dua mondmilito, sed estis refondita antaŭ 50 jaroj je la 3<sup>a</sup> de januaro 1958.

La unua prezidanto de nia nuna KEA estis s-ro Alfons Andersson, sperta Esperantisto kiu enmigris Kanadon en 1957 el Karlskoga, Svedio. Dez Hackett, kanadano kiu naskiĝis en Edmontono, estis ĝia unua sekretario-kasisto.

Jam en somero 1958 estis tri aliĝintaj kluboj, en Spy Hill (Saskaĉevano), Toronto kaj Montrealo. Ne-aliĝintaj kluboj ankaŭ ekzistis: La *Societo Esperantista de la Mauricie* en Tri-Riveroj (Kebekio), kaj *Dalhousie Esperanto-Klubo* en Universitato Dalhousie (en Halifakso, Novskotio). Post iom da tempo oni forlasis la ideon pri “aliĝintaj grupoj”, ĉar en praktiko ĝi ne sukcesis influi klubanojn aliĝi individue al KEA, cele al tio ke la klubo havu sufiĉajn membrojn en KEA, por ke ĝi rajtu elekti iun por reprezenti ĝin en la estraro de KEA.

La plej sukcesa klubo en la fruaj jaroj de KEA estis tiu en Tri-Riveroj, gvidita, kaj inspirita, de s-ino Thérèse Héroux. Ĝi kreskis al proksimume cent membroj, kaj sukcesis aranĝi, en oktobro 1959, la nomigon de unu el la stratoj en Tri-Riveroj per la nomo *de l'Espéranto* — la unua Esperanto-strato en Kanado. La klubo de Kebeko baldaŭ ankaŭ superis cent membrojn, sub gvido de Vincent Beaupré, s-ino Doré, kaj aliaj.

Kelkaj membroj de tiuj kluboj estis ankaŭ membroj de KEA, sed plimulto restis membroj nur de la kluboj. Kiel ili allogis tiom da membroj? Artikolo en paĝo 5 de la *Kanada Esperanto-Revuo* (kies nomo poste reŝanĝiĝis al *Lumo*) en printempo 1960 klarigas tion: vidu suben. Ĝi estis verkita de s-ro Georges Héroux, urba inĝeniero de Tri-Riveroj, edzo de Thérèse Héroux. K. P.

## Libroservo de KEA

La Libroservo de KEA bonvenigas viajn mendojn. Facilas konsulti la retan katalogon kaj mendi rete. Kelkaj novaj titoloj aldoniĝis lasttempe. Ni ankoraŭ havas kelkajn ekzemplerojn de la 2007/2008 papera katalogo se vi preferas tion. Simple skribu al la adreso de KEA por peti senpagan ekzempleron. Bonan legadon !

[www.esperanto.qc.ca/katalogo/](http://www.esperanto.qc.ca/katalogo/)

## Kiel funkcias la plej multnombra grupo en Kanado?

Unue mi volas rimarkigi la malsimilecon de nia organizo kompare kun tiu de aliaj grupoj konataj de mi. La gvidantoj de tiaj kluboj verŝajne havas kiel ĉefan celon lernigi Esperanton al plej eble multnombraj personoj per la organizo de tro seriozaj kursoj.

Bedaŭrinde okazas, ke tro malmultaj personoj konsentas studi tiamaniere, kaj post jaroj de aktiva laboro preskaŭ ĉiuj eksteruloj ne konas eĉ la nomon de Esperanto. Aliflanke, nia grupo estas ĉefe *socia klubo*, kies membroj ricevas elementajn kursojn senpage.

La sociaj kunvenoj estas multnombraj kaj tre diversaj. Lastatempe ni sukcese organizis kursojn jene: unu persono kiu povas konvene instrui la lingvon invitas dudekon el siaj geamikoj ĉeesti distran vesperkunvenon. Tiuokaze la gastoj ricevas Esperantan lecionon nur duonhoran. Por tiuj kunvenoj mi verkis tre mallongigitan kurson, kiu konsistas el nur 10 unupaĝaj lecionoj enhavantaj la plej bezonatajn vortojn por ĉiutaga uzo. Ni tiamaniere sukcesis interesigi multajn “tre okupitajn personojn”, kiuj neniam lernus Esperanton alimaniere.

Neniu povas nei, ke tiaj metodoj pruviĝis sukcesplenaj en nia ĉirkaŭaĵo. Sufiĉas mencii, ke ni kalkulas kiel membrojn de nia komitato la prezidanton de nia Lerneja Komisiono, la ĉefredaktoron de la tagĵurnalo *Le Nouvelliste*, la edzinon de la direktoro de nia televidstacio – kaj la nombro de niaj grupanoj sumiĝas je 75. Tiaj gravuloj jam lernis sufiĉe de la lingvo por taksu ĝian valoron kaj neniam preterlasas okazon favore komenti pri Esperanto antaŭ siaj multnombraj konatuloj.

Mi kredas, ke la ĝenerala uzado de similaj metodoj pli rapidigus la disvastigon de la lingvo en nia lando.

Georges Héroux

El la *Kanada Esperanto-Revuo*, printempo 1960, p. 5.

## Esperantigado de amerikaĵoj

Estas pluraj konceptoj kaj nomoj de amerikaj aĵoj, ideoj kaj lokoj, kiuj meritas esti esperantigitaj.

Kiu ŝatus kunlabori kun mi por redakti la amerikan terminaron en:

[www.bonalingvo.it/index.php/Amerika\\_terminaro](http://www.bonalingvo.it/index.php/Amerika_terminaro)

Dankon!

Renato Corsetti

[renato.corsetti@esperanto.org](mailto:renato.corsetti@esperanto.org)



## Okazis en Kanado

### 2008 estas proklamita de UNESKO Internacia jaro de lingvoj.

En Kanado, tuj je la unua de januaro, dufoje dissendiĝis dekminuta intervjuo franclingva pri Esperanto, ĉe la nacia radio-stacio (Société Radio-Canada, Première Chaîne 95,1), je la 10h30 kaj 23h30. La intervjuo estis elsendita ankaŭ satelite per la reto Sirius tra la tuta Nord-Ameriko. Normando Fleury parolis koncize pri la historio de la movado, pri la avantaĝoj de Esperanto kaj fine pri la okazonta TAKE-7 en Montrealo. Eblis aŭdi E-muzikon de Jacques Yvart kaj Kajto. (N. Fleury)

### Jacques Yvart estadis en Montrealo.

Pasintdecembre, la franca Esperantista kantisto Jacques Yvart [ĵak ivar], kiu kantas kanzonojn de la fama franca kanzonisto Brassens Esperante kaj france, koncertis plurfoje en Montrealo. Li dufoje koncertis en la *Studio-théâtre en Place des Arts*, ĉiam france, sed dum la koncertoj menciis Esperanton. La programa folio krome raportis, ke li eldonis kodiskon kun kantoj de Brassens en Esperanto. Li ankaŭ koncertis en kafejoj kantante iom en Esperanto. La nacia radio-stacio informis pri tio kaj ludigis la kanzonon *Verda benk'* de Brassens. Fine, antaŭ sia foriro, li akceptis private rakonti pri sia vivo kaj private koncerti por Esperantistoj en la Montreala Esperanto-domo. Vere belaj momentoj tio estis, por ĉiuj ĉeestantoj! (N. Fleury)

### Prelego pri Esperanto

La 18<sup>an</sup> de februaro, mi prelegis pri la historio de Esperanto antaŭ 30 personoj, kiuj gvidas turistojn en la Montreala Botanika Ĝardeno. Estis granda intereso kaj multaj demandoj pri la uzeblecoj de la lingvo, ĝia gramatiko kaj tiel plu. (N. Fleury)

## Anoncetoj

Karegaj geamikoj el Kanado! El Rio de Ĵanejro, mi salutas vin! Mi estas mallerta komencanto de Esperanto kaj mi serĉas kanadanojn por amikiĝi. Dankon pro via ĝentileco.

Ronaldo Silva

*ronaldosilva-por.mondpaca@oi.com.br*

Estimataj gesamideanoj! Pardonu la ĝenon, sed eble mia informo trafas al la ĝustaj kaj helpemaj personoj. Mi estas Manfred Kirsch Brandstr kaj mi skribas por kontakti intersemuloj pri jenaj aferoj: mi kolektas uzitajn, afrankitajn kaj stampitajn leterkovertojn kaj poŝtkartojn, precipe tiajn, kiuj iam estis dum korespondado senditaj de Germanio al via lando. Ĉio kun rekompenco!

*mafrajoklaki@freenet.de*

## Dankeme pri la ricevitaj donacoj !

Pluraj Kanadaj Esperantistoj reagis al nia peto pri mondonacoj, por subteni la alvenon de Latinamerikanoj kiuj ne povas mempagi la kostojn por partopreni TAKE 7. Danke al tiuj donacoj, ni povas anonci al vi ke ni povis inviti Kubaninon kaj Argentinanon. Ili ambaŭ ludos gravan rolon dum TAKE 7 kontribuante al la programo. Ni kompreneble bonvenigas pliajn donacojn ĉar ni ŝatus inviti artistojn por la vesperaj programoj. Uzu la aliĝilon/donacilon por TAKE-7, kiu troviĝas en la Lumo por sendi solidarecan sumon.

## Raporto pri ARE 2007 en Silvero, NY

(*Noto : Teksto verkita de komencantino*) Mi ĝuis ARE tre multe. Por mi, estis tre longa vojaĝo. Je vendredo (la 5<sup>a</sup> de oktobro), mi veturis nokte, do mi ne vidis ion ajn. Je sabata mateno, mi renkontis Karena Klahr, la alia homo ĉe ARE el Majno. Karena kaj mi promenis ĉirkaŭ la tereno. Estis tre bela! Ni ankaŭ kajakis kaj poste la programo komenciĝis.

Mi decidis iri al la baza kurso, ĉar en la kurso estis kelkaj homoj kiuj, kiel mi, plejparte sciis la bazaĵon pri Esperanto, sed bezonis ekzerci paroli kun aliaj homoj. Sed, la baza kurso estis tro baza por mi. Tamen, dum la fino de la baza kurso, la instruisto (Ron Glossop) komencis instrui dum li parolis Esperante. Tio estis tre bona, ĉar mi jam sciis la temojn, kaj mi ĝuis aŭdi pri Esperanto en Esperanto! (Sed ne tro rapide aŭ malsimple). Eble por la venonta ARE, estus bone havi kurson por tiuj kiuj scias la bazon, sed volas ekzerci paroli kun aliaj kun la sama nivelo de scio. Por tia kurso, vortaroj estus grava. Kompreneble por ARE, oni bezonus anglan kaj francan vortarojn. Eble ankaŭ Eo-Eo vortaro, kiel la PIV.

Mi ne ĉeestis ĉiun klason de la baza kurso ĉar mi ne lernis multe dum la komenco de la kurso, kaj ankaŭ ĉar mi volis aŭdi la programaĵojn! Mi ĉeestis la sesion kun malgrandaj prelegoj. Mi ĝuis ĝin ĉar se mi ne komprenis iun, mi poste komprenis la sekvantan homon! Se mi povos ĉeesti ARE 2008, mi certe ne iros al la baza kurso. Sed, mi supozas, ke tio devus okazi tiel ke oni ĉeestas la bazan kurson nur dum sia unua partopreno.

Dum ARE, mi koniĝis plej multe kun homoj dum la manĝoj. Mi dormis en la dometo Hillcrest, sed la aliaj viroj en mia ĉambro, iris dormi antaŭ aŭ post mi. Fakte, mi parolis kun nur unu el ili por demandi *Kioma horo estas?*

Post ARE, Karena veturigis min al Bangor en Majno. Ni iris tra Nov-Hampŝiro kaj Vermonto. La arboj estis belegaj! Ankaŭ Karena kaj mi parolis pri ARE kaj aliaj temoj dum la ok/naŭ horoj al Bangor. Ĉe Bangor, mia edzo (Joĉjo, bedaŭrinde li ne estas Esperantisto) renkontis min kaj ni veturis al nia hejmo en Seal Harbor (Foka Haveno), Majno. Ĉi-jare ĉe ARE, mi plejparte aŭskultis aliajn paroli Esperanton. Mi esperas, ke mi pliboniĝos dum ĉi-jaro, do ĉe ARE 2008 mi komprenus pli kaj parolus pli! Mi ankaŭ volas vidi Montrealon! Bedaŭrinde, mi ne jam vizitis ĝin. Eble mi vidos vin tie...

Ĝis, Mikelo

## **Avo Frosto respondis...**

Mi anoncis al vi en aŭtuno 2007, ke Avo Frosto respondos en Esperanto al la infanoj de la mondo, kiuj skribos al li en decembro 2007. Nu, jen mi ŝatus raporti al vi, al kiom da infanoj Avo Frosto respondis.

Sume 49 infanoj skribis al li el 7 landoj; detale, ili estis 22 el Pollando, 12 el Francio, 8 el Japanio, 3 el Ĉekio, 2 el Kanado kaj po 1 el Hungario kaj Tajvano.

Mi ĝojas vidi, ke la informo pri Avo Frosto atingis ne nur Eŭropon, sed ankaŭ Azion. Surprize, ke malmultaj infanoj el Kanado skribis kaj eĉ ne unu el Usono, lando kie Avo Frosto estas tre populara. Eble malmultaj lernejoj intruas Esperanton en Kanado kaj Usono, kompare kun Pollando, Francio kaj Japanio.

Mi esperas, ke vi estos obeemaj dum la jaro kaj memoros en decembro 2008 inviti infanojn skribi al Avo Frosto en Esperanto. Tio estas ja bona maniero pruvi, ke Esperanto estas vivanta lingvo.

Raportis Normando la ĉefkoboldo

## **Esperanto-diplomo!**

Ĉu vi ŝatus havi internacian diplomon, kiu atestus vian lingvan konon en Esperanto? Eblas ekzameniĝi dum TAKE 7 en Montrealo. La ekzamenoj de ILEI-UEA (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) estas serioze organizitaj; se iu deziras partopreni ilin, necesas, ke li/ŝi antaŭanoncu sin. La ekzameno konsistas el tri sesioj: gramatika testo unuhora, skriba parto trihora kaj parola parto dudekminuta. Kutime la afero disvolviĝas ene de tri tagoj, sed foje ene de du, kun gramatika testo matene kaj skriba parto posttagmeze. Ĉar tiuj ekzamenoj estas internaciaj, ili estas 100% en Esperanto, sen iu ajn traduko aŭ uzo de alia lingvo. Pri la ILEI-UEA-ekzamenoj vi povas legi precizan priskribon en gvidilo ĉe [www.edukado.net](http://www.edukado.net). Eblas ankaŭ mendi de la libroservo de UEA la paperan gvidilon.

Notu, ke por kovri la ekzamenajn kostojn necesas pagi 50\$.

Se vi ŝatus havi internacian Esperanto-diplomon, bonvolu rapide anonci vin ĉe la organiza komitato de TAKE 7, ĉe [informo@take7.ca](mailto:informo@take7.ca).

## Nova kaj interesa el la reto

### Videoprogramoj de Claude Piron

Ĉu vi aŭdis pri la serio de dekminutaj franclingvaj videoprogramoj kun la titolo *Les langues : Un défi*, en kiuj Claude Piron (ĵus forpasinta) laŭgrade kondukas la spektanton al la solvo *Esperanto*? Ili estas videblaj ĉe [www.youtube.com](http://www.youtube.com). Sufiĉas tajpi en Youtube *Claude Piron* por trafi ilin. Estus bone ke kebekiaj kaj aliaj franclingvaj kanadaj Esperantistoj sciuj, ke tiuj programoj ekzistas kaj estas facile videblaj.

### Fajrovulpo nun en Esperanto

La populara, libera retnaviga programo Firefox nun ekzistas ankaŭ en Esperanto. La unua versio de la traduko estis publikigita en la lasta semajno de septembro 2007, sed la kompletigo kaj plibonigado de la Esperanta versio daŭras. La esperanta traduko estas distribuata kiel aldonaĵo, per kiu eblas kompletigi ajnalingvan version de Firefox. “*Mi mem instalas la tradukon, kaj nun uzas ĝin. Ĝenerale ĝi ŝajnas tre bone farita*”, opinias Bertilo Wennergren. (El Libera Folio. Vidu [www.liberafolio.org/2007/fajrovulpo](http://www.liberafolio.org/2007/fajrovulpo))

### Al la monda Esperantistaro

Mi skribas al vi por alvoki vin subteni la kampanjon *La Koloro Oranĝa* por kiu mi estas internacia sekretario. La celo estas atentigi pri la subpremo de la homaj rajtoj en Ĉinio okaze de la Olimpiaj Ludoj en aŭgusto 2008. Ni volas enkonduki la koloron oranĝan kiel simbolon de kritiko al la ĉina registaro. Ni alvokas al ĉiuj, kiuj eniros la olimpian stadion vaste uzi la koloron, ekz. per vestaĵoj kaj diversaj objektoj kiel papero, naztukoj ktp. Mi invitas vin prezenti la kampanjon kaj diskuti kiel subteni ĝin. La manieroj kontribui estas senfinaj. Ekz. ni bezonas tradukon de la ĉe-metita alvoko en multege da lingvoj por la lanĉo de la kampanjo, kiun ni planas por la komenco de la nova jaro. Ni tre volonte ricevos viajn ideojn pri agado. Ni laboradas pri retejo de la projekto. La Esperantan tekston vi trovos ĉe [www.thecolororange.net/uk/page21\\_eo](http://www.thecolororange.net/uk/page21_eo). Mi esperas aŭdi de vi cele al fruktodona kunlaboro. Kore salutas S-ro Vagn Frausing [contact@thecolororange.net](mailto:contact@thecolororange.net)

### Agadi por la Homaj Rajtoj

Mondcivitana reto fondiĝis en Lieĝo *Agadi por la Homaj Rajtoj*, nova organizaĵo membro de ASKOP [www.recim.org/ascop/a7-eo.htm](http://www.recim.org/ascop/a7-eo.htm)

### Farbskatol'

Temas pri tiel nomata “vidblogo” en Esperanto. Ĝi spektebligas filmetojn senditajn de sendependaj kontribuantoj. Ekde aprilo 2006, po du videoj semajne estas aldonataj. Estas sufiĉe amuze kaj ĉio bone funkcias. Indas subteni tiajn iniciatojn. <http://farbskatol.net>

### Rezolucio de U.N. por la jaro 2008

Se interesus vin legi la rezolucion pri plurlingvismo akceptita de la ĝenerala Asembleo de UN, jen la ligo : [www.kniivila.net/wp-content/uploads/2007/05/plurlingvismoun.pdf](http://www.kniivila.net/wp-content/uploads/2007/05/plurlingvismoun.pdf)

## Buller esploris pri UK en Kubo

Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, vizitis Kubon de la 2<sup>a</sup> ĝis la 9<sup>a</sup> de februaro laŭ invito de Kuba Esperanto-Asocio. La celo de lia vizito estis esplori la kondiĉojn por okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en Havano en la jaro 2010. Kun subteno de ŝtataj, urbaj kaj turismaj aŭtoritatoj KEA invitas la esperantistan mondrenkontiĝon al Kubo jam por la dua fojo. Unuafoje la UK, la 75<sup>a</sup>, sukcese okazis en la kuba ĉefurbo en julio 1990.

Buller renkontis funkciulojn de diversaj instancoj, kies sinteno al la reokazigo de UK estas tre entuziasma. Li estis akceptita i.a. de s-ro Fernando Rojas, vicministro pri kulturo, kaj s-ro Conrado Martínez, prezidanto de la Kuba Kongresa Buroo kaj antaŭe urbestro de Havano. Krome li renkontis funkciulojn de la Ministerio pri Turismo, Kuba Libroinstituto, Fremdlingva Eldonejo José Martí, la nacia flugkompanio Cubana kaj Radio Havano. Grava estis la rekonatiĝo de Buller kun la kongresejo, kiu en 1990 donis perfektajn kondiĉojn por la UK. Intertempe ĝi estis renovigita, kun alkonstruo de hotelo, kie la kongresejo disponas pri pliaj salonoj. La ĝenerala direktoro vizitis multajn hotelojn kaj restoraciojn, admirante la multobliĝon de ilia nombro kaj entute la radikalan disvolviĝon de turismo en Kubo dum la pasintaj 18 jaroj.

Dum la vizitoj al unuopaj lokoj Buller estis akompanata de estraranoj de Kuba Esperanto-Asocio. Surpriza kaj agrabla estis la konatiĝo kun s-ro Abdel Fattah Ezzeldin, ambasadoro de Egiptio, kiu lernis Esperanton en 1982 en Budapeŝto. Li invitis Buller kun reprezentantoj de Kuba Esperanto-Asocio al sia rezidejo por vespermanĝo, kiun ĉeestis ankaŭ la ambasadoroj de Jamaiko, Kamboĝo kaj Pollando, honora konsulo de Finnlando, direktoro de la oficejo de Unesko por la Kariba regiono, kaj prezidantino kaj aliaj funkciuloj de la Nacia Unesko-Komisiono de Kubo. Dum la vespero la ambasadoro pruviĝis lerta pledanto por Esperanto, kiu kun siaj Esperanto-kolegoj kompetente respondis al plej diversaj demandoj de la ne-Esperantistaj gastoj.

Ĵaŭdon, la 7<sup>an</sup> de februaro, okazis en la teatro de la Nacia Biblioteko José Martí simpozio pri la 100-jariĝo de UEA, kun partopreno de ĉirkaŭ 100-kapa publiko. Pri sia Esperantisteco kaj idealoj kaj avantaĝoj de la lingvo verve parolis ambasadoro Abdel Fattah Ezzeldin. Prelegojn pri la historio de la movado en Kubo kaj ĝiaj ligoj kun UEA faris la prezidanto de KEA Julián Hernández Angulo, kunordiganto de la Amerika Komisiono de UEA Maritza Gutiérrez González, kaj la estraranoj de KEA Juan Ramón Rodríguez kaj Alberto Fernández-Calienes Barrios. Kiel omaĝon de la kuba Esperantistaro al la forpasinta Claude Piron aktorino Yoandra Isabel Rodríguez deklamis lian poemon “La sufero de l’aliaj”.

## Esperanto en la UNESKO - retejo

Danke al la nova atento de UEA al la agado de Unesko kaj la aktiveco de UEA por diskonigi la Internacian Jaron de Lingvoj, celebratan ĉi-jare, Unesko afiŝis en sia retejo ankaŭ Esperantan tradukon de la deklaro de la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Koiichiro Matsuura, pri tiu speciala jaro de UN kaj Unesko. En multaj landoj aktivuloj de UEA ludis rolon por atentigi la naciajn komisionojn de Unesko kaj aliajn oficialajn instancojn pri la Jaro, kaj komunaj aktivaĵoj estas planataj. Esperantistoj ankaŭ laboris por traduki la deklaron de Matsuura al diversaj lingvoj. La deklaro de Matsuura en Esperanto kaj aliaj lingvoj troviĝas ĉe [http://portal.unesco.org/culture/en/ev.php-URL\\_ID=36000&URL\\_DO=DO\\_TOPIC&URL\\_SECTION=201.html](http://portal.unesco.org/culture/en/ev.php-URL_ID=36000&URL_DO=DO_TOPIC&URL_SECTION=201.html)

## Kanada kalendaro - grupoj kun regulaj kunvenoj

**Halifakso :** Ni kunvenas proksimume dufoje ĉiumonate, sed tute ne regule. Ni havas neniun formalan programon, kaj simple konversacias pri io ajn laŭplaĉe. Plej ofte estas de kvar ĝis ok ĉeestantoj ĉe niaj kunvenoj. La sekvonta du-hora kunveno okazos dimanĉon, la 24<sup>an</sup> de februaro 2008, je la 14:00<sup>a</sup> horo, ĉe la hejmo de Steĉjo Norvell en Halifakso, NS. Ni bonvenigas ankaŭ vin al la kunveno. Bonvolu kontakti nin por informo kaj se vi bezonas veturadon tien. Notu bone: ni preskaŭ neniam krokodilas dum la kunvenoj.  
[www.esperanto.ca/eo/halifax](http://www.esperanto.ca/eo/halifax)

**Montrealo :** La kunvenoj okazas la lastan vendredon de ĉiu monato krom en decembro kaj la somero. Vi estas bonvena en la Montreala Esperanto-domo (MEDO), 6358-a de Bordeaux ; uzu la metroon ĝis stacio Beaubien kaj buson 18 orienten. La 29<sup>an</sup> de marto 2008 je la 19a : diskuttemo "Radio-elsendoj. Ĉu vi aŭkultas radion ? Ĉu vi aŭkultas esperantajn elsendojn ?" La 25<sup>an</sup> de aprilo 2008 je la 19<sup>a</sup> : diskuttemo "Poezio". [www.esperanto.qc.ca/eo/activites](http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites)

**Otavo :** La Esperanto-Rondo de Otavo regule kunvenas du fojojn ĉiumonate. Niaj du oficialaj renkontiĝlokoj estas la kafejo Bridghead kaj la Universitato de Otavo, escepte de nia ĉiujara Zamenhofa-festo. En niaj renkontiĝoj, ni celas diskuti diverstemajn aferojn uzante la internacian lingvon, Esperanto. En la kafejo, ni simple babilas kaj ĝuas kafon, kaj dum la universitataj renkontiĝoj ni okupiĝas pri formalaj klubaj aferoj aŭ aŭdas prelegon rilate al interesa temo. Tiuj, kiuj jam bone ellernis la lingvon estas bonvenaj simple veni kaj ĝui la diskutadon, dum kaj komencantoj kaj progresantoj estas kuraĝigitaj veni por ke ili profundiĝu en samideanplenan etoson. Ĉiaokaze, ni varme bonvenigas vin al la Esperantlingva flanko de Otavo.  
[www.esperanto.ca/eo/ottawa](http://www.esperanto.ca/eo/ottawa)

**Toronto :** Ni kunvenas ĉiusemajne en multaj ejoj en la urbo. Kutime, ni kunvenas lunde je 18:00, ĝis 20:00, ĉe la kafejo "Timothy's" je la nordorienta angulo de Bay kaj College, okcidente de la College-metro-stacio. Poste, kelkaj el ni manĝos en loka manĝejo. De tempo al tempo ni kunvenas en la hejmo de unu el la klubanoj, kie ankaŭ estas la biblioteko de la rondo. Tie ni interparolas pri interesaj aferoj, ĝuas kunmanĝadon kaj pli bone konatiĝas kun la aliaj. Kontakti Scott por pliaj informoj. [ert@sunspace.org](mailto:ert@sunspace.org)

**Kalgario :** Vizitu la retejon kaj petu informojn pri la venontaj kunvenoj.  
<http://esperantocalgary.blogspot.com/>

**Vankuvero:** La Vankuvera Esperanto-Societo regule kunvenas por praktiki la lingvon en la urbocentro. Ni fieras ke inter niaj membroj, estas homoj el diversaj devenoj kaj etnoj. Tio donas tre internacian etoson al la kunvenoj. <http://esperanto.memlink.ca/>

**Viktorio:** Nia klubo tre regule kunvenas, kaj estas tre vigla. La klubo kunvenas ĉiun lundon de 12:00 ĝis 14:00 en la domo de Wally kaj Olga Du Temple, 765 Braemar Avenuo, North Saanich, BC, V8L 5G5. Dum tiu kunveno ni tagmanĝas kaj babilas Esperante kaj diversmaniere progresigas nian regon de Esperanto per tradukado, ludoj, prelegetoj, kaj konversacio. [www.esperanto.ca/victoria/](http://www.esperanto.ca/victoria/)

# Kanada Esperanto-Asocio

Canadian Esperanto Association – Association canadienne d'espéranto  
6358-A, de Bordeaux, Montréal QC H2G 2R8



**Alighilo / Realighilo - Membership Application - Adhésion**  
**Resendu al - Send with cheque to- Adresse pour paiement:**  
**KEA, 2372, Haddington, Ottawa, ON K1H 8J4**

.....  
name / nomo/nom

Year of birth if under 30 yrs./ Naskighjaro se malpli ol 30-jara  
Année de naissance, si moins de 30 ans

.....  
Address / Adreso / Adresse

.....  
City / Urbo/Ville

Postal code / Poshtkodo/Code postal



.....  
Tel. no. / Telefono / Téléphone



.....  
Email / Retadreso / Courriel

**PERMISSION** to publish - **PERMESON** presi - **PERMISSION** de publier  
Vian Nomon? [    ],      Adreson? [    ],      Retadreson ? [    ]

=====  
**Fee Schedule - Kotizoj - Cotisations**

**2008**

<b>Individual / Unupersona / individuelle</b>	<b>\$ 25</b>	<b>\$ _____</b>
<b>Limited income / Reduktita / Faible revenu</b>	<b>\$ 10</b>	<b>\$ _____</b>
<b>Family / Geedza / Familiale, 1 ekz. de Lumo</b>	<b>\$ 32.50</b>	<b>\$ _____</b>
<b>Life membership / Dumviva membreco / À vie</b>	<b>\$ 250</b>	<b>\$ _____</b>
<b>Donations / Donacoj / Dons</b>		<b>\$ _____</b>

**S U M E    \$ \_\_\_\_\_**

**Bonvolu sendi la formulon kaj chekon al la kasisto:**  
**KEA 2372, Haddington, Ottawa ON, K1H 8J4**

**KEA** estas peranto por du bonaj gazetoj, **Monato** kaj **Ondo**

Monda novaĵgazeto' **MONATO**' Vidu <http://www.esperanto.be/fel/mon/>

'Monato'	aere \$ 78	surface \$ 73	rete \$ 43.80
'La Jaro'	aere \$ 15	surface \$ 9	



-----  
**'La Ondo de Esperanto'** - Internacia sendependa magazino en Esperanto -

**Eventoj:** Artikoloj, informoj, intervjuoj pri Esperanto

**Tribuno:** Malkaŝaj opinioj pri diversaj temoj

**Vide el Bruselo:** Lingvopolitika rubriko de Dafydd ab Iago

**Vortoj de Komitatano Z:** Unika primovada rubriko

**Beletro:** Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj

**Civilizo:** Kia estis, estas kaj estos nia mondo

**Arkivo:** Historio de Esperanto sub lupeo

**Nia Trezoro:** La plej gravaj libroj en Esperanto

**Kore kaj roke:** Muzika rubriko de Flor

**Simpla abono** por 2008: \$ 47

**Aerpoŝta aldono:** \$ 7

**Elektronika abono (pdf):** \$ 18

Podkasta servo: senpage

Abonu mem kaj abonigu viajn amikojn!

**Por aboni al MONATO kaj aŭ ONDO**, sendu ĉekon, kun la necesaj informoj, al **KEA**

**p/a Yves Bellefeuille, kasisto,**

**2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4.**

**Reto: [yan@storm.ca](mailto:yan@storm.ca)**

=====

### **Universala esperanto-Asocio (UEA)**

Peranto en Kanado: **Olga DuTemple**, al kiu sendu ĉekon por via kotizo

**765 Braemar Avenue,**

**North Saanich**

**BC V8L 5G5**

### **Kategorioj:**

**MG** — Individua membro, kiu ricevas nur la Gvidlibron tra la Esperanto-movado

**MJ** — Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron

**MA** — Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron kaj la revuon Esperanto

**DMJ** — Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la Jarlibron.

**DM** — Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la Jarlibron kaj la revuon Esperanto.

**SZ** — Societo Zamenhof (patrona kategorio)-kies kotizo estas aldone al la ordinara kotizo.

	<b>MG</b>	<b>MJ(-T)</b>	<b>MA(-T)</b>	<b>SA</b>	<b>Kto</b>	<b>SZ</b>
<b>Kanadaj dolaroj</b>	<b>14</b>	<b>34</b>	<b>86</b>	<b>52</b>	<b>31</b>	<b>172</b>





BOTANIKEJO



SUNOCIRKO



OLIMPIKEJO



METROARTO

## 7a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE7) 12a–18a de julio 2008, Montrealo, Kebekio, Kanado



Tutamerikaj kongresoj celas progresigi la esperantan movadon en Ameriko kaj plifortigi solidarecon inter esperantistoj el Norda, Centra kaj Suda Ameriko. TAKE tradicie havas allogan etoson kaj riĉan programon. Partoprenas ĝin esperantistoj ne nur el amerikaj landoj, sed ankaŭ el pluraj aliaj mondopartoj. Do jen invito al vi partopreni en la sepa Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE7) okazonta ĉe ni en Montrealo venontjare.

### TAKE7: Kongresa temo


### Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj:

### diverseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj

La programo de TAKE7 similos al la programo de aliaj esperantujaj kunvenegoj per sia duobla karaktero: jen programeroj distraj, sociumaj, turismaj kaj jen programeroj seriozaj, problemorientitaj. Programa duflankeco tamen ĝenerale nur ŝajna en TAKE7. Eĉ pluraj *distraj* programeroj (notinde artaj vesperoj kaj urbaj vizitoj) estos fakte samtempe amuzaj kaj klerigaj, riĉigante la *seriozan* traktadon de la kongresa temo, gravega por ni ĉiuj. Por pli bone kompreni tiun ĉi temon kaj ties praktikan signifon por ni, ankaŭ kiel esperantistoj, helpos nin, krom prelegoj kaj aliaj prezentaĵoj de fakuloj, aro da diskutaj kaj studaj eventoj (*praktikumo*), kies unu rezulto estu bone fondita komuna kongresrezolucio.

### Montrealo: Gastiganto de TAKE7

Mondurbego multkultura kaj multlingva, tre ekologie orientita, Montrealo aparte taŭgas por TAKE7 kaj ties temo. Situante kerne de pli-ol-200-insula arĥipelago en la riverego Sankta-Laŭrenco, ĝi ilustras ne nur kulturan kaj lingvan diversecon, efektive respektante la devizon **DIVERSECO EN UNUECO**, sed ankaŭ diversecon ekologian. Nordamerika urbego francakĉenta, unu el la tri *internaciaj urboj de dezajno* de Unesko, Montrealo havas atutojn aprezatajn de multaj ĝiaj diversoriginaj vizitantoj kaj... loĝantoj. Ravas ĝia latineco, ravas ĝia malfermiteco al la fremdo, ravas ĝia kultura bunto multkvartale spertebla. Tutjare kaj precipe nordhemisfersomere ĝi vibras feste: kelkaj grandaj festivaloj kaj strataj eventoj tre ĝuindaj okazos efektive tuj antaŭ, dum kaj post TAKE7!



**Bonvenigas vin al Montrealo la LKK de TAKE7. Detalojn ĉe [www.take7.ca](http://www.take7.ca).**

## Enketo pri KEA / Survey on CEA / Sondage sur l'ACE.

- I do not understand esperanto.  
*Please return this form without answering questions but you can add comments about CEA's magazine, web site and book service.*
- Je ne comprends pas l'espéranto.  
*SVP retourner le sondage sans répondre au questions mais vous pouvez inscrire vos commentaires sur la revue, le site web, etc.*

*Ni dankas vin antaŭe ĉar viaj respondoj helpas nin pli bone plani la agadon de KEA en la venontaj jaroj.*

Mi estas membro de KEA ekde la jaro : .....

Mia lingva nivelo estas :  baza  meza  alta  akademia

### La Lumo

Mi ŝatus ricevi la kanadan revuon *Lumo* jare :  2 foje  3 foje  4 foje

Mi ŝatus ricevi retan version kaj ne plu ricevi la paperan.

Mi ŝatus ke estu ankaŭ artikoloj angle kaj france.

Mi ŝatus ke estu apartaj enmetitaj folioj nacilingve.

Mi ŝatus ke *Lumo* enhavu artikolojn pri (eblas elekti pli ol unu) :

<input type="checkbox"/> Kanada movado	<input type="checkbox"/> internaciaj novaĵoj
<input type="checkbox"/> gramatiko	<input type="checkbox"/> korespondaj anoncoj
<input type="checkbox"/> paco	<input type="checkbox"/> ekologio
<input type="checkbox"/> scienco	<input type="checkbox"/> interesaj retejoj
<input type="checkbox"/> pli da fotoj	
<input type="checkbox"/> aliaj organizoj (Amnestio Internacia, Greenpeace ktp)	

Komentoj pri *Lumo* / Comments / Commentaires : .....

.....

### Retejo / Web site / Site Web

Mi havas komputilon :  hejme  laboreje  publika loko  Mi ne uzas komputilon

Mi vizitas la retejon de KEA:  ofte  regule  malofte  neniam

Mi ŝatus pagi mian aliĝon al KEA rete per Paypal (kreditkarto) aldonante 5% pli.

Mi movadumas rete (legas, babilas, vizitas retejojn en esperanto)  ofte  malofte  neniam

Komentoj pri la retejo de KEA / Comments / Commentaires : .....

.....

**Biblioteko** : La movado posedas esperantajn librojn kaj eventuale eblus organizi pruntan servon. La uzantoj pagus la sendkostojn (tien/reen) kaj povus konservi la libron dum monato. Mi interesiĝus uzi la novan libropruntan servon : .  jes  eble  ne

**Libroservo** : Eblas aĉeti librojn rete de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de aliaj libroservoj.

Ĉu KEA daŭre ofertu enlandan libroservon ?  jes  ne  mi ne scias

**Revuoj** : Ĉu KEA estu peranto por diversaj e-revuoj (Monato, Literatura Foiro, ktp)  je (kaj mi interesiĝus aboni almenaŭ unu)  ne  eble

Pliaj komentoj pri KEA / Comments about CEA / Commentaires sur l'ACE : .....

.....



**T  
A  
K  
E  
7**

## **Sepa Tut-Amerika Kongreso de Esperanto**

*Septième Congrès d'espéranto des Amériques*

*Seventh Esperanto Congress of the Americas*

*Séptimo congreso de esperanto de las Américas*

*Sétimo congresso de esperanto das Américas*

### **Montrealo 2008**

56<sup>a</sup> landa kongreso de  Esperanto U S 

## **Aliĝilo / donacilo**

Antaŭnomo : ..... Familia nomo : .....

Akompanantoj : .....

Kompleta adreso : .....

Lando : ..... Poŝta kodo: .....

Telefono : (.....)..... alia : (.....).....

Reta adreso : .....

Kotizoj: Ebligas partopreni E-USA kongreson kaj TAKE-7 dum aŭ kvar aŭ ok tagoj.  
E-USA kongreso okazos de la 11<sup>a</sup> - 14<sup>a</sup> de julio 2008.  
Inkluzivas la fakan programon de ambaŭ kongresoj kaj la kulturajn eventojn.  
Ne inkluzivas la bankedon, antaŭ- kaj postkongresajn ekskursojn, manĝojn kaj tranoktadojn.

- 75 \$ CAD/USD : kvartaga (11<sup>a</sup> - 14<sup>a</sup> de julio) ĝis la 15<sup>a</sup> de marto 2008
- 90 \$ CAD/USD : kvartaga (11<sup>a</sup> - 14<sup>a</sup> de julio) ĝis la 31<sup>a</sup> de majo 2008
- 110 \$ CAD/USD : kvartaga (11<sup>a</sup> - 14<sup>a</sup> de julio) ekde la 1<sup>a</sup> de junio 2008 kaj surloke
- 100 \$ CAD/USD : semajna (11<sup>a</sup> - 18<sup>a</sup> de julio) ĝis la 15<sup>a</sup> de marto 2008
- 120 \$ CAD/USD : semajna (11<sup>a</sup> - 18<sup>a</sup> de julio) ĝis la 31<sup>a</sup> de majo 2008
- 140 \$ CAD/USD : semajna (11<sup>a</sup> - 18<sup>a</sup> de julio) ekde la 1<sup>a</sup> de junio 2008 kaj surloke

Mi volas partopreni la bankedon kiu inkluzivas spektaklon kaj dancon : 30\$ CAD/USD per persono

Kiom da personoj : .....  Vegetarano  Alergioj : .....

Mi donacas por helpi esperantistojn nepagipovajn partopreni TAKE-7.

.....\$ CAD/USD - kvitanco havebla por Kanadanoj, krcu   
*Donaco je la nomo de Esperanto-Societo Kebekia*

Mi interesiĝas pri

- retaj novaĵoj pri TAKE-7
- kontribuo al la faka aŭ kultura programo (klarigu sube)

Komentoj/petoj : .....

.....  
.....

Vidu dorse

Mi mendas tranoktadon (la prezoj inkluzivas impostojn kaj administrajn kostojn. Limdato 28<sup>a</sup> de marto 2008.

- 110\$ CAD/USD prezo por paro : « Studio Suite » en UQAM. Privata loĝejo; ĉambro kun duobla lito, kuirejeto, salono, banejo kaj duŝo, klimatizilo, televido, litotukoj, bantukoj; ne inkluzivas manĝilaron, kuirilojn. Ideala por paro kun infano. Estas nur 4 haveblaj, mendu rapide.
- 80\$ CAD/USD prezo por paro : « Studio » en UQAM. Privata ĉambro kun duobla lito, kuirejeto, banejo kun duŝo, litotukoj, bantukoj; ne inkluzivas manĝilaron, kuirilojn. Ideala ebleco por paro.
- 55\$ CAD/USD prezo por persono: « Multi-8 » en UQAM. Privata ĉambro kun unuopa lito, litotukoj, bantukoj; 8 personoj dividas komunajn kuirejon, salonon, kaj 3 banejojn kun duŝo; ne inkluzivas manĝilaron, kuirilojn. Belega vido al la urbo-centro. Ideale por persono kiu volas amikiĝi kun aliaj tamen havante privatan ĉambron.
- ĉe esperantistoj (nur por nepagipovuloj)
- mi mem zorgos

Cirklumu la mendatajn datojn : Julio 6 - 10 - 11 - 12 - 13 - 14 - 15 - 16 - 17 - 18 - 19 - 20 - 21

Sume por tranoktado: ..... \$ CAD/USD kosto ponokte X .....kiom da noktoj = ..... \$CAD/USD

Eblas mem mendi tranoktadon en hotelo « Lord Berri » : 120 \$ CAD/USD + impostoj / unuope aŭ duope kaj 10\$ CAD/USD por kroma persono. Indiku « Esperanto-Kongreso »; notu ke ili ne parolas esperanton. Voku senpage : 1.888.363.0363 au mendu rete: info@lordberri.com www.lordberri.com

## Aliĝilo al la antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

Ni rekomendas al vi sendi vian aliĝilon al la ekskursoj samtempe kun via aliĝilo al TAKE-7. Tamen eblas aparte aliĝi al la ekskursoj sed la limdato estas la 31<sup>a</sup> de majo 2008. La ekskursaj kotizoj ne estas repageblaj sed ili estas transdoneblaj al alia persono. Notu : La prezoj ne inkluzivas la manĝojn kaj la tranoktadojn en Montrealo en jaŭdo (2008-07-10) kaj vendredo (2008-07-11). Vi devas mendi la tranoktadon aparte.

Mi aliĝas al la kvartaga antaŭ-kongresa ekskurso al Kebeko/Wendake indianejo/Naturejo (7<sup>a</sup> -10<sup>a</sup> de Julio)

- 250\$ CAD/USD (provizora prezo) : Tranoktado en kvarlita ĉambro, necesejo komuna
- 325\$ CAD/USD (provizora prezo) : Tranoktado en dupersona ĉambro, necesejo privata
- 430\$ CAD/USD (provizora prezo) : Tranoktado en unupersona ĉambro, necesejo privata

Dum la ekskurso, mi preferas viziti muzeojn , indianejojn , naturejon .

Mi aliĝas al la dutaga postkongresa ekskurso al Kebeko  aŭ al Otavo . (2008-07-19/20)

- 135\$ CAD/USD : Tranoktado en kvarlita ĉambro, necesejo komuna
- 145\$ CAD/USD : Tranoktado en dupersona ĉambro, necesejo privata
- 190\$ CAD/USD : Tranoktado en unupersona ĉambro, necesejo privata

La kostoj validis en Januaro 2008. Tamen, ni ne povas garantii al vi la finan koston ĉar kosto de benzino, nova imposto, ktp povus influi la finkalkulojn.

Mi pagas per  ĉeko (CAD aŭ USD) je la nomo de Esperanto-Societo Kebekia  
 kreditkarto (uzu Paypal, vizitu nian retejon : www.take7.ca kaj alklaku : kiel aliĝi ?)

Totalo pagata : .....\$ CAD/USD Dato:.....Subskribo :.....

TAKE-7 estas organizata kunlabore kun la Amerika Komisiono de UEA kaj la Kanada Esperanto-Asocio.

**Société québécoise d'espéranto • Esperanto-Societo Kebekia**

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal, Québec, Canada • H2G 2R8 • www.take7.ca • info@take7.ca